

KATOLIKA SENTO

Periodico dell'Unione Esperantista Cattolica Italiana (UECI)

www.ueci.it

"Per la promozione della fratellanza e della comprensione tra i vari popoli di diverse lingue" (Paolo VI)

Periodico bimestrale - Reg. trib. di Vercelli 22.12.1997 n. 306 -
Sped. in abb.post. art. 2 comma 20/c L662/96 - filiale di Vercelli -
Direttore resp.: Mons. Gianni Ambrosio - Dir. e amm.: Vercelli, via Benadir, 62
tipografia edizioni **SAVIOLO** s.n.c. - Vercelli

Anno 92 - n. 5
SETTEMBRE-OTTOBRE 2013

Lumen Fidei

È arduo riassumere in poche parole otantaquattro pagine di enciclica scritta a quattro mani, ma con un solo cuore, da Benedetto XVI e da papa Francesco che la firma. Con essa si chiude il trittico de encicliche di papa Benedetto sulle virtù teologali: "Deus caritas est" (2005), "Spes salvi" (2007), "Lumen fidei" (2013).

Il sottostante riassunto vuole invogliare il lettore alla lettura del testo completo.

All'inizio il papa definisce che cosa è la luce: è il dono portato da Gesù: *"Io sono venuto nel mondo come luce, perché chiunque crede in me non rimanga nelle tenebre"*. Poi si chiede se questa luce sia una illusione per l'uomo di oggi orgoglioso della sua razionalità.

Ma la sola ragione non è capace di illuminare il futuro: dobbiamo riscoprire la luce della fede, che ci apre gli occhi.

Dopo questa premessa, l'enciclica si sviluppa in quattro capitoli.

Estas malfacile resumi per kelkaj vortoj la okdek-du-paĝan enciklikon verkita kvarmane, sed unu-kore, de Benedikto la 16a kaj de papo Francisko, kiu ĝin subskribas. Ĝi fermas la triopon de enciklikoj de papo Benedikto pri la teologiaj virtoj: "Deus caritas est" (2005), "Spes salvi" (2007), "Lumen fidei" (2013).

La suba resumo celas instigi la leganton al la legado de la tuta verko.



Unue la papo difinas, kio estas la lumo: ĝi estas la donaco portata de Jesuo: *"Mi venis lumo en la mondon, por ke ĉiu, kiu kredas al mi, ne restadu en mallumo"*. Poste li sin demandas, ĉu ĉi tiu lumo estas nur iluzia por la nuntempulo, orgojla pri lia racieco.

Sed la nura racio ne kapablas lumigi la estontecon: oni devas remalkovri la lumon de la fido, kiu malfermas niajn okulojn.

Post ĉi tiu premiso, la encikliko disvolviĝas en kvar ĉapitroj.

Nel primo capitolo intitolato “ABBIAMO CREDUTO NELL'AMORE (*1 Gv 4,16*)”, il papa inizia considerando la figura di Abramo che si è fidato della parola di Dio e delle sue promesse. Poi considera la storia della fede da Mosè al popolo di Israele fino alla pienezza della fede cristiana. La storia di Cristo manifesta pienamente l'affidabilità di Dio. Non solo crediamo a Cristo (cioè alle sue parole), ma anche in Cristo, quando lo accogliamo personalmente e ci affidiamo a lui.

Nel secondo capitolo “SE NON CREDETE NON COMPRENDERETE (*Jes. 7,9*)”, si considera l'abbinamento fede e verità e il bisogno umano di verità. Ma la verità non può essere disgiunta dall'amore. Senza amore la fede diventa fredda, senza fede l'amore diventa effimero. Inoltre la fede è unita alla ragione; la scienza riceve giovamento dalla fede.

Il terzo capitolo “VI TRASMETTO QUELLO CHE HO RICEVUTO (*1 Kor 15,3*)”, tratta della trasmissione della fede nel corso dei secoli per mezzo della Tradizione Apostolica conservata dalla Chiesa. Questa avviene principalmente tramite i sacramenti. Inizialmente con il Battesimo in cui il battezzando professa il suo credo, ma massimamente con l'incontro personale con Cristo nell'Eucarestia.

Il quarto capitolo con titolo “DIO PREPARERÀ PER LORO UNA CITTÀ (*Eb 11,16*)”, dimostra come la luce della fede illumina le relazioni tra gli uomini. Unità all'amore la fede è a servizio della giustizia, del diritto e della pace. Se si toglie la fede in Dio nelle nostre città si affievolirà la fiducia tra di noi e sarà minacciata la stabilità. Ma la fede si dimostra importante nei legami familiari e nell'educazione della prole. Inoltre la fede è una forza consolante nella sofferenza. Il cristiano sa che la sofferenza non può essere eliminata, ma può diventare un atto di amore e di fiducia in Dio, che mai ci abbandona.

L'enciclica si conclude ricordando la fede di Maria con le parole dell'evangelista Luca: “Beata colei che ha creduto (*Lc 1,45*)”

En la unua ĉapitro titolita “NI KREDIS JE LA AMO (*1 Joh 4,16*)”, la papo startas prikonsiderante la figuron de Abramo, kiu fidis en la Parolo de Dio kaj en liaj promesoj. Poste li prikonsideras historion de la fido ekde Moseo, al la popolo de Israelo ĝis la pleneco de la fido kristana. La historio de Kristo plene montras la fidelecon de Dio. Ni kredas ne nur al Kristo (t.e. al liaj vortoj) sed ankaŭ je Kristo, kiam ni akceptas lin persone kaj plene konfidas en li.

En la dua ĉapitro “SE VI NE KREDOS, VI NE KOMPRENOS (*Jes. 7,9*)”, oni prikonsideras la duopon fido kaj vero kaj la homan bezonon de vero. Sed la vero ne povas esti disigita de la amo. Sen amo la fido iĝas malvarma, sen fido la amo iĝas malstabila. Krome la fido estas kunigita kun la racio; la scienco eltiras utilon el la fido.

La tria ĉapitro “MI TRANSDONAS AL VI TION, KION MI RICEVIS (*1 Kor 15,3*)”, pritraktas la transdono de la fido dum la jarcentoj pere de Apostola Tradicio konservata de la Eklezio. Tiu transdono okazas precipe per la Sakramentoj. Unue per la Bapto, en kiu la baptato konfesas sian kredon, sed pleje per la persona renkontiĝo kun Kristo en la Eŭkaristio.

La kvara ĉapitro titolita “DIO POR ILI PRETIGIS URBON (*Heb 11,16*)”, montras kiel la lumo de la fido prilumas la rilatojn inter la homoj. Kunligita kun la amo la fido estas je la servo de la justeco, de la rajto kaj de la paco. Se oni forigas la fidon je Dio en niaj urboj, malfortiĝos la reciproka fido, kaj la stabileco estos endanĝerigita. Sed la fido montras sian gravecon en la familiaj ligiloj kaj en la eduko de la idaro. Krome la fido estas konsola forto en la sufero. La kristano scias, ke la sufero ne povas esti forigita, sed povas iĝi ago de amo kaj konfido en Dio, kiu neniam forlasas nin.

La encikliko finiĝas memorante la fidon de Maria per la vortoj de la evangeliisto Luko: “Feliĉas ŝi, kiu kredis (*Luk 1,45*)”.

66-a kongreso de IKUE

(Kalwaria Zebrzydowska, 13.-20.07.2013)



La Italioj ĉe la Kongresejo

kongreso. Partoprenis en la kongreso kvindekda da esperantistoj el naŭ eŭropaj landoj, inter ili ses italoj. Temo de la kongreso estis "Nova evangelizado". La programo estis tre riĉa kaj tre interesa. Malgraŭ la pluva kaj frosta vetero de la unuaj tagoj, ĉio disvolviĝis glate inter preĝoj, vizito al Krakovo, sur la spuroj de papo Johano Paŭlo la 2a, bedaŭrinde sub la pluvo. Akompanataj de klera ĉiĉerono, ni vizitis la urbon. Memorindaj estis la vizitoj al la Episkopa Palaco, kie loĝis la iama Kardinalo Karol

la temo de la kongreso rekte el Kamerunio pere de Skajpo. La ĉefaj eroj de nia kongreso estis, la tuttaga pilgrimo al Krakovo (lunde), la kutima Ĝenerala Kunsido de IKUE (marde) kaj la tuttaga pilgrimo al Auschwitz kaj Wadowice (ĵaŭde). Tre interesa estis la vizito al Krakovo, sur la tero de la unuaj tagoj, ĉio disvolviĝis glate inter preĝoj, vizito al Krakovo, sur la spuroj de papo Johano Paŭlo la 2a, bedaŭrinde sub la pluvo. Akompanataj de klera ĉiĉerono, ni vizitis la urbon. Memorindaj estis la vizitoj al la Episkopa Palaco, kie loĝis la iama Kardinalo Karol Marija Belošević, Wojtiła, al la Jagellona

Kalwaria Zebrzydowska, tridekon da kilometroj sude de Krakovo, estas unu el la plej famaj polaj sanktejoj. Ĝi estas vizitata ĉiujare de pli ol unu miliono da pilgrimantoj. La sanktejo staras sur altaĵo, ĉirkaŭata de arbaro en kiu oni povas piediri laŭ la ses kilometroj de la fama Krucvojo kun ĝiaj 28 stacioj aŭ laŭ la Maria-vojo kun 24 stacioj. La tuta aro de kapeloj kun la Baziliko, realigitaj en la 17a jc. de la familio Zebrzydowski, estis nomumita de UNESCO "kultura heredaĵo de la homaro". En ties pilgrima domo okazis la 66a IKUE-

kiu lerte organizis kaj zorgis pri ĉio. Interese estis al la malnovan parton de la fakto, ke monsinjoro Gabriel Anda prelegis pri muregoj kaj antaŭata de



Kalwaria Zebrzydowska: Baziliko




Krakovo: Wavel - Katedralo

fortika barbakano. La vizito de la urbo finiĝis ĉe Vavel-kastelo en la Katedralo de sanktaj Stanislaŭ kaj Venceslao. Posttagmeze ni vizitis la nun konstruatan grandegan Centron Johano Paŭlo la 2a en kies kriptoj oni celebris la Meson. De tie ni atingis la alian grandegan kaj modernan Bazilikon de la Dia Mizerikordo ligita kun S.ta Faustyna Kowalska.

Dum la IKUE-kunveno de mardo matene oni prezentis la Ikue-agadon. La prezidanto anoncis, ke la pasintan jaron IKUE akiris la laŭleĝan proprieton de sia domo en Romo. Fine oni decidis proponi ekumenan kongreson en Trento por la venonta jaro.

La Ĵaŭda ekskurso, ĉi-foje sub la suno, estis tre riĉa. Unue ni vizitis la koncentrejojn de Auschwitz, kie, interalie, la estraranoj de IKUE akiris la permeson eniri la ĉelon de patro

Kolbe por meti bukedon da floroj. Post tiu kortuŝa vizito ni atingis Harmeŝen por viziti la Centron Maksimiliano Kolbe. En la kriptoj de ties preĝejo ni povis rigardadi la centojn da impresaj desegnoj de Marian Kołodziej, kiu travivis kvin jarojn enprizonigita en Auschwitz. Post la tagmanĝo en restoracio, ni veturis al Wadowice, la naskiĝurbo de papo Johano Paŭlo la 2a. Tie oni celebris Meson en la Baziliko



Pentraĵo de Marian Kołodziej

de la Oferdono de Maria, kie Karol Wojtiła estis baptita. Sekve ni vizitis la apudan Muzeon de Johano Paŭlo la 2a. Sur la vojo de la reveno ni haltis ĉe la vilaĝo Zagórnik kie folkloro ensemblo amuzigis nin



Wadowice: Preĝejo

per kantoj kaj dancoj. En la apuda lernejo titolita al Lazaro Ludoviko Zamenhof la lernejestro akceptis nin, vizitigis al ni la lernejon en kiu tradicie estas instruata Esperanto.



Vendrede okazis la tradicia adiaŭa vespero per mallongaj prezentadoj de kuraĝaj volontuloj de la diversaj landoj. Oni devas rekoni, ke la italoj per iliaj iom ĥaosaj kantadoj pleje amuzigis la publikon.

Giovanni Daminelli



MALFERMITAJ AL LA TUTA MONDO

Rubriko zorge de frato Pierluigi Svaldi

TUA È LA POTENZA

L'uomo, con la sua immaginazione, si attribuisce tutto quello che desidera; è capace di pensare di essere come Dio e di fare a meno di Dio, e, con l'aiuto della tecnica e delle scoperte scientifiche, offre rimedi insperati. Soprattutto nel campo della medicina l'uomo riesce a presentarsi come il solutore dei casi più disperati.

Eppure sappiamo che l'uomo nel suo intimo è posseduto da uno spirito gregario che lo porta ad appoggiarsi a qualcuno pur di avere un minimo di protezione. Così, un po' per l'istinto di conservazione, un po' per i problemi della vita, l'uomo cerca di mettere al sicuro la propria esistenza, la propria identità culturale, la tranquillità di vita, la stima, gli affetti, e soprattutto la propria incolumità fisica.

Inoltre l'uomo sperimenta troppa insicurezza anche nell'affrontare la vita, nel fare scelte definitive, nell'accettare il futuro, nel fare pace con le proprie delusioni o mancanze. Lo si capisce quando vediamo l'uomo che cerca di nascondere o di soffocare la paura con la distrazione, la superficialità, i discorsi vuoti, il desiderio di nuove sensazioni, l'accumulo di ricchezze varie; oppure quando lo vediamo demoralizzato e scoraggiato.

Per fortuna, la fede religiosa soccorre l'uomo in questo campo, aiutandolo a vivere con un maggior equilibrio che va perseguito e riconquistato continuamente. Infatti la religiosità risulta essere una com-

VIA ESTAS LA POTENCO

La homo, per sia imagipovo, asignas al si ĉion, kion li deziras; li kapablas pensi esti kiel Dio kaj rezigni pri Dio; kaj, helpe de la tekniko kaj de la sciencaj esploroj, li ofertas neespereblajn rimedojn. Pleje en la fako de la medicino la homo kapablas sin prezenti kiel la solvanto de la plej senespe-raj kazoj.

Tamen ni scias, ke la homo en sia anim-profundo estas posedata de dependemo, kiu pelas lin sin apogi al iu ajn, nur por havi minimuman ŝirmon. Tiel, iom pro la instinkto de memkonservo, iom pro la problemoj de la vivo, la homo klopodas meti en sekurecon sian propran ekzistadon, sian propran kulturen identecon, la vivtrankvilecon, la estimon, la amrilatojn, kaj ĉefe sian propran fizikan sendanĝerecon.

Aldone la homo spertas troan malsekurecon ankaŭ kiam li alfrontas la vivon, kiam li faras definitivajn elektojn, kiam li akceptas la estontecon, kiam li paciĝas kun siaj elreviĝoj aŭ pekoj. Oni komprenas ĉi tion kiam ni vidas la homon, kiu klopodas kaŝi aŭ sufoki la timon per la distro, la supraĵeco, la senenhavaj paroloj, la deziro pri novaj sensacioj, la amasigo de diversaj riĉecoj; aŭ kiam ni vidas lin demoralizita kaj senkuraĝiĝinta.

Feliĉe, la religia fido subtenas la homon en tiu ĉi kampo, helpante lin vivi en pli granda ekvilibro, kiu devas esti daŭre celata kaj rekonkerata. Fakte la religieco aspektas esti laŭnatura komponanto en la

ponente connaturale nell'uomo che cerca un po' di stabilità nel suo intimo.

Perfino Gesù di Nazareth, quando si rivolge ai suoi discepoli, li rincuora sempre, esortandoli a «*non temere*» di essere in pochi, a non spaventarsi delle ostilità che incontrano, a non scoraggiarsi se la gente viene e va con troppa incostanza. Addirittura Gesù dice loro di rallegrarsi, perché questo rientra nel piano di Dio: «*Non temere, piccolo gregge, perché al Padre vostro è piaciuto dare a voi il Regno*» (Lc. 12,32).

Analizzando un po' il testo, possiamo dedurre che è meglio per noi essere «*piccolo gregge*» dove ognuno si sente impegnato e utile, piuttosto che vivere in un grande partito, gregari di un padrone troppo forte. Inoltre, affidarsi unicamente al «*Padre*» che è nei cieli e fare di tutto perché questo lo si veda nella concretezza della vita, ci mette in cammino e ci permette di fare delle cose che non sarebbero possibili in altro modo.

Soprattutto nel mondo della Riforma la preghiera del «Padre nostro» continua con le parole: «*Poiché tuo è il regno, tua la potenza e la gloria nei secoli*» per rilanciare una fiducia forte in Dio. Infatti la «*potenza*» di Dio può garantire a quanti si rivolgono a Lui quella sicurezza e protezione, necessarie per non essere bloccati dalle paure che accompagnano l'uomo e per guardare al futuro con viva speranza.

Ripetere anche ogni giorno «*tua è la potenza*» significa ripartire dal punto in cui ci si trova, bello o brutto, incoraggiante o meno, e fare di tutto per scrivere sulla terra, cioè per concretizzare ciò che crediamo fermamente essere stato richiesto da noi, anche se l'ambiente circostante non accetta o non sottoscrive la nostra vocazione.

homo, kiu serĉas iom da stabileco en sia animprofundo.

Eĉ Jesuo de Nazareto, kiam li sin adresas al siaj disĉiploj, ĉiam kuraĝigas ilin, instigante ilin «*ne timu*» pro tio, ke ili estas malmultaj, ne teruriĝu pro la kontraŭecoj, kiujn ili trafas, ne malkuraĝiĝu se la homoj venas kaj foriras tro malkonstante. Eĉ diras Jesuo al ili, ke ili ĝojiĝu, ĉar ĉi-tio apartenas al la plano de Dio: «*Ne timu, malgranda grego, ĉar bone plaĉis al via Patro doni al vi la Regnon*» (Lk. 12,32).

Analizante mallonge la tekston, ni povas konkludi ke estas pli bone por ni esti «*malgranda grego*», kie ĉiu sentas sin okupita kaj utila, ol vivi en granda partio kiel subuloj de tro forta mastro. Krome, konfidi sin ekskluzive al la «*Patro*» kiu estas en la ĉielo kaj fari ĉion eblan, por ke ĉi tio estu evidenta en la konkretco de la vivo, metas nin sur la irvojon kaj permesas al ni fari aferojn alimaniere neeblajn.

Ĉefe en la mondo de la Reformacio la preĝo «*Patro nia*», pludaŭras per la vortoj: «*Ĉar via estas la regno kaj la potenco kaj la gloro eterne*» por relanĉi fortan fidon je Dio. Fakte la «*potenco*» de Dio povas garantii al tiuj, kiuj sin adresas al Li, tiujn sekurecon kaj ŝirmon, necesajn por ne esti blokataj de la timoj, kiuj akompanas la homon, kaj por rigardi la estontecon kun viva espero.

Rediri eĉ ĉiutage «*via estas la potenco*» signifas restarti de la punkto, en kiu ni estas, bela aŭ malbela, kuraĝiga aŭ ne, kaj fari ĉion eblan por skribi sur la teron, t.e. por konkretigi tion, kion ni firme kredas esti petita de ni, eĉ se la ĉirkaŭa medio ne akceptas aŭ ne subskribas nian alvokon.

Dirite inter ni ...



027

VENTO

- Kia ventaĉo!
- Vi pravas, estas vera ventaĉo!
- Ĝi signas la sezon-sanĝiĝon.
- Ni estas en Oktobro.
- La somero finiĝis.
- Kaj jam komenciĝis la aŭtuno.
- Montriĝas multaj fenomenoj tipaj de la sezono.
- Unu estas la vento.
- Sed oni sentas, ke la tagoj fariĝas pli freŝaj.
- Jes, la aero ne plu estas tiom varma, kiel en la tagoj pasintaj.
- Sur la montoj falas neĝo.
- Jes, je 1500 metroj.
- Tamen, tio influas.
- Rilate kion?
- Kompreneble, rilate la temperaturon de la atmosfero.
- Tion diras la televido, kiam ĝi parolas pri la antaŭvidoj veteraj.
- Kelkfoje ĝi eraras.
- Kiam ŝanĝiĝas la sezono, ĝi ne eraras.
- Sed la vento daŭre forte blovas.
- Kaj ĝi kreas ĥaŝon.
- Rigardu, kiel kirladas tiuj folioj miksitaj kun paper-pecoj.
- Arbo-folioj kun paper-folioj.
- Denove kune.
- Kial?
- Ĉar ambaŭ venas de la arboj.
- Prave vi diras, nur estas diferenco.

VENTO

- Che ventaccio!
- Hai ragione, è proprio un ventaccio.
- Segna il cambio di stagione.
- Siamo in ottobre.
- È finita l'estate.
- Ed è già iniziato l'autunno.
- Si evidenziano molti fenomeni. tipici della stagione.
- Uno è il vento.
- Ma si sente che i giorni diventano più freschi.
- Sì, l'aria non è più tanto calda come nei giorni passati.
- Sui monti cade la neve.
- Sì, a 1500 metri.
- Tuttavia, ciò influisce.
- Su che cosa?
- Naturalmente, sulla temperatura dell'atmosfera.
- Questo lo dice la televisione, quando parla delle previsioni del tempo.
- Qualche volta sbaglia.
- Quando cambia la stagione, non sbaglia.
- Ma il vento soffia forte in continuazione.
- E crea il caos.
- Guarda come girano quelle foglie mescolate con pezzi di carta.
- Foglie d'albero e fogli di carta.
- Di nuovo insieme.
- Perché?
- Perché ambedue vengono dagli alberi.
- Dici giusto, solamente c'è una differenza.

-
- La folioj falas ĉiun aŭtunon.
 - Kaj ili renoviĝas printempe.
 - Paperon oni bezonas ĉiam.
 - Kaj oni daŭre segas arbojn.
 - Kaj oni detruas la grandajn arbaregojn.
 - Ĉie en la mondo.
 - Kaj oni ne restarigas ilin.
 - Mi esperas, ke en iu loko oni estas antaŭ-
videmaj.
 - Certe, ie oni agas racie.
 - Kaj oni zorgas pri la replantado de la
arboj.
 - Pri rearbarigo.
 - Mi esperas, ke iom post iom, tion oni ĉie
faros.
 - Tio estas nur espero.
 - Sed oni devas esti optimistoj.
 - Kaj labori por realigi tiun revon.
 - Tial, ĉar ĝi ne devas resti simpla revo.
 - Mi esperas, ke io konkretiĝos.
 - Ankaŭ mi tion esperas.
 - Sed dum ni parolas la vento pli kaj pli
blovas.
 - Bonŝance ĝi ne estas tro malvarma.
 - Ne troigu. Ni ne eniris la vintran sezonon.
 - Tiam ni bezonos niajn surtutojn.
 - Por la momento sufiĉas nia jako.
 - Sed mi jam vidis iun kun skarpo ĉirkaŭ la
kolo.
 - Temas pri personoj pli delikataj ol la aliaj.
 - Aŭ de homoj iom maljunaj, kiuj sentas pli
multe la ŝanĝiĝojn de la vetero.
 - Ĉiu kondutas laŭ necese.
 - Ni klopodu elteni ĉi venton.
 - Le foglie cadono ogni autunno.
 - E si rinnovano in primavera.
 - Si ha sempre bisogno di carta.
 - E si segano alberi in continuazione.
 - E si distruggono le grandi foreste.
 - Dappertutto nel mondo.
 - E non si ricostruiscono.
 - Spero che in qualche luogo si sia pre-
videnti.
 - Certamente, da qualche parte si agisce
ragionevolmente.
 - E ci si cura del ricollocamento degli
alberi.
 - Del rimboschimento.
 - Spero che un po' alla volta lo faranno
dappertutto.
 - È solamente una speranza.
 - Ma si deve essere ottimisti.
 - E lavorare per concretizzare quel sogno.
 - Per questo motivo, perché non rimanga
un semplice sogno.
 - Spero che qualcosa si farà concreto.
 - Lo spero anch'io.
 - Ma mentre parliamo, il vento soffia sem-
pre di più.
 - Per fortuna non è troppo freddo.
 - Non esagerare. Non siamo entrati nella
stagione invernale.
 - Allora avremo bisogno dei nostri cappotti.
 - Per il momento è sufficiente la nostra
giacca.
 - Ma ho già visto qualcuno con la sciarpa
attorno al collo.
 - Si tratta di persone più delicate degli altri.
 - O di persone un po' vecchie, che sentono
di più i cambi del tempo.
 - Ognuno si comporta secondo necessità.
 - Cerchiamo di sopportare questo vento.


UEA-JARLIBRO

- Hodiaŭ mi ricevis interesan kaj utilan libron.
- Pri kio temas?
- Ĉu vi konas la jarlibron de UEA?
- Ne, mi neniam vidis ĝin.
- Estas grava manko flanke de vi.
- Nun ne troigu.
- Mi ne troigas: ĉiu bona esperantisto devus posedi ĝin.
- Kaj kion oni devas fari por akiri ĝin?
- Estas facile: vi devas fariĝi individua membro de UEA.
- Kaj kiamaniere mi povus utiligi ĝin?
- Nu, se vi estas esperantisto vi havas kontaktojn kun la tuta mondo.
- Kompreneble.
- Kaj se vi bezonas ion eksterlande, vi povas trovi perantojn inter la delegitoj de Universala Esperanto-Asocio.
- Kaj kie mi trovas la adresojn de la delegitoj de UEA?
- En la jarlibro, kompreneble.
- Kaj kiom da delegitoj estas?
- Por scii, kiom da delegitoj estas, oni povas tion kalkuli en la jarlibro.
- Sed mi ne posedas ĝin.
- Fariĝu individua membro de UEA.
- Kaj kie oni tion povas fari?
- En Italio, tion vi povas fari ĉe Itala Esperanto-Federacio.
- Ĉu vi konas la adreson de Itala Esperanto-Federacio?
- Memkompreneble, ke mi konas ĝin.
- Bonvolu diri ĝin al mi.
- Ĝi estas: Strato Villoresi, 38, Milano.
- Tro malapude por mi.
- Nu, la kluboj estas kunligitaj kun IEF - Itala Esperanto-Federacio.
- Ĉu tio signifas, ke mi povus anigi pere de

L'ANNUARIO DELL'UEA

- Oggi ho ricevuto un libro utile e interessante.
- Di che si tratta?
- Conosci l'annuario dell'UEA?
- No, non l'ho mai visto.
- È una grande mancanza da parte tua.
- Ora non esagerare.
- Non esagero: ogni buon esperantista dovrebbe possederlo.
- E che cosa si deve fare per procurarselo?
- È facile: devi diventare membro individuale dell'UEA.
- Ed in che modo potrei utilizzarlo?
- Ebbene, se sei un esperantista, hai contatti con tutto il mondo.
- Naturalmente.
- E se hai bisogno di qualcosa all'estero, puoi trovare dei mediatori fra i delegati dell'Associazione Universale Esperantista.
- E dove trovo gli indirizzi dei delegati dell'UEA?
- Nell'annuario, naturalmente.
- E quanti delegati ci sono?
- Per sapere quanti delegati ci sono si possono contare nell'annuario.
- Ma non lo possiedo.
- Diventa socio individuale dell'UEA.
- E dove si può far ciò?
- In Italia lo puoi far presso la Federazione Esperantista Italiana.
- Conosci l'indirizzo della Federazione Esperantista Italiana?
- Naturalmente che lo conosco.
- Dimmelo, per piacere.
- È: Via Villoresi, 38, Milano.
- Troppo lontano, per me.
- Beh, i circoli sono collegati con la FEI - Federazione Esperantista Italiana.
- Questo significa che potrei farmi socio

- mia klubo?
- Jes, tio estas ebla.
- Kaj kiom kostas la jara alig-kotizo?
- Estas pluraj kotizoj, sed mi konsilas vin pagi 84.000 italajn lirojn por ricevi kaj la jarlibron kaj la revuon "Esperanto".
- Al mi ŝajnas bona ideo.
- Kaj vi ricevos ankaŭ la membro-karton kun la markoj.
- La markoj?
- Tiuj garantios al la delegito, ke vi estas membro de UEA.
- Ĉu por la respondo?
- Jes, por la respondo.
- Kaj pri la elspezoj?
- Vi rajtos havi personan konton ĉe UEA, kaj tiun konton vi povos utiligi por ĝiri sumojn sur la konton de la delegito, kiu nepre devas esti membro de Universala Esperanto-Asocio.
- Interese.
- Ne nur, sed en la Jarlibro vi trovos informojn pri ĉiuj asocioj esperantistaj kunligitaj kun UEA.
- Mi aliĝos, kiam mi estos 24-jara.
- Se vi estas tiom juna, mi devas ĉion reklari al vi.
- per mezzo del mio circolo?
- Sì, è possibile.
- E quanto costa la quota di adesione annuale?
- Ci sono diverse quote, ma io ti consiglio di pagare 84.000 lire per ricevere sia l'annuario sia la rivista "Esperanto".
- Mi sembra una buona idea.
- E riceverai anche la tessera di socio con i bollini.
- I bollini?
- Quelli garantiranno al delegato, che sei socio dell'UEA.
- Per la risposta?
- Sì, per la risposta.
- E per le spese?
- Avrai diritto ad avere un conto personale presso l'UEA, e quel conto lo potrai utilizzare per girare delle somme sul conto del delegato che deve senz'altro essere socio dell'Associazione Mondiale degli esperantisti.
- Interessante.
- Non soltanto, ma nell'Annuario troverai delle informazioni su tutte le associazioni esperantiste collegate con l'UEA.
- Mi farò socio a 24 anni.
- Se sei così giovane, devo rispiegarti tutto.



Nia eta Parnaso

Rubrica dedicata alla Poesia

Rubriko dediĉita al Poezio

FIORI

*Dentro questi fiori che germogliano
Sui petali c'è uno schema
Un punto geometrico del loro mutare
Calco o prisma segno o disegno adesso
Nelle fibre nelle volte del colore
Ma è in questo fragile scavo in altra luce
La linea di frattura che si plasma
Nella guglia di un nucleo più sottile
Nel serto che in uno stame più si cela
Nella matrice più chiusa e avvolgente
Nella non forma
Ma forma dentro dove è pura
Nell'alveo che in una cima più si tende
Nel limbo che in una gemma più si snoda.*



FLOROJ

*Ene de ĉi-floroj kiuj burĝonas
Sur la petaloj estas skemo
Geometria punkto de ilia ŝanĝiĝo
Muldaĵ' aŭ prismo signo aŭ desegno nun
En la fibroj en la volboj de 'l koloro
Sed estas en ĉi-fragila kavo en alia lumo
La fendo de rompiĝo kiu sin modlas
En la pinaklon de pli maldika kerno
En florkronon, en stameno enkaŝiĝintan
En la matrikson plej fermitan kaj ĉirkaŭvolvan
En la ne-formon
Sed formo ene kie ĝi estas pura
En la fluejon kiu en cumo pli etendiĝas
En la limbon kiu en burĝono pli artikiĝas*




NEL FONDO DELL'IMMAGINE

*quest'immagine
è un accordo musicale
una cadenza di poche note
che si allontana rapida
nel suono
è il lento battere di un ritmo
immerso dentro il tempo
un rumore bianco
una sintonia
la musica
silenziosa della mente.*

FONE DE LA IMAGO

*ĉi-tiu imago
estas muzika akordo
kadenco de malmultaj notoj
kiu rapide foriras
en la sono
ĝi estas la lanta ritma takto
ensorbata ene de la tempo
ia blanka bruoj
iu sintonio
la muziko
silenta de la menso*



Paola Ruggeri

Esperantigis Norma Cescotti


Johano la 23-a kaj la dua Vatikana Koncilio

(prelego de Norma Cescotti dum la 27-a UECI-kongreso)

Ĉi-jaron 2013 okazas la 50a datreveno de la morto de papo Johano, la 23a difinita “la bona papo”, la papo kiu konceptis kaj komencis la duan Vatikanan Koncilion.

Angelo Roncalli naskiĝis la 25an de novembro 1881 en Soto il Monte, provinco de Bergamo, en granda kamparana familio, kiu enkalkulas pli ol tridek personojn inter gepatroj, gefiloj kaj duonfarmuloj, kies travivo ne estas kampara idilio sed kruta, konstanta laboro ofte malhelpata de naturaj neantaŭvideblaj faktoroj. Simpla vivo, malriĉa sed inda.

La etulo Angelo vizitante la trian elementan klason ricevas lecionojn pri latina kaj itala lingvoj, nekonstante kaj sendetale, de paroĥestro de apuda vilaĝo kaj, poste oni registras lin ĉe la tria gimnazia klaso en la prestiĝa Kolegio Celana, kiu nin gastigas. Dekunujara, li eniras en la Seminarion kaj ne ankoraŭ dekkvaraĝa, li fariĝas kleriko kaj ekverkas sian taglibron, kiu, konsistigos la unuan parton de la fama “*Ĵurnalo de la animo*”, kies verkadon li daŭrigas ĝis la morto. Temas pri tagnotoj celantaj memori proponojn, registri spiritajn spertojn kaj ekzameni propran konsciencon. En tiu seminario, regata laŭ la stilo de tiuj tridentanaj, postulantaj rigoran vivon, studadon kaj preĝadon, ne cirkulas ĵurnaloj, ne trapertras noticoj kaj oni ne permesas pluteni eksterajn kontaktojn. Ĉio-ĉi utilas al forĝado de lia religia vivo. Inter la stud-



objektoj li preferas lerni la teologion de la Ekleziaj Patroj, la historion de la dogmoj, tiun de la Eklezio kaj la historion paŝtistan, kiuj multe utilos al li, dum lia estonta pap-regado.

En Januaro 1900 Roncalli transloĝiĝas al Romo por studadi ĉe la roma seminario Apollinare, kie ekzistis stipendioj favore al bergamaj klerikoj.

En la jaro 1901 Angelo Roncalli devas interrompi la studadon pro la soldata servo, kiun li konsideras “Babilona kaptiteco”. Li skribas en sian taglibron: “*Mi estas ŝokita pro la maniero per kiu miaj soldatkamaradoj parolas kaj vivas, kaj mi indignas ĉar pli ol la duono de homoj fariĝas hontindaj bestoj. Amarigas min, precipe, la fakto ke tiuj sacerdotoj turpigas sian sanktan karakteron*”. Tiu estas, la unua, fia kolizio kun la ekstera medio sed, tamen, tiuj spertoj multe sukcesas plifirmigi liajn idealojn, krome, incitas lin plue sindediĉi, ĝis la sinofero al la Dia Volo.

En la jaro 1904, en Romo, li pastrigas. Li raportas memoron de tiu tago en sian “*Ĵurnalon de*

la animo”: “*Eldirinte la furon, mi vidis la imagon de la Mado-no, rideti al mi de la altaro, inspirante al mi sencon de milda trankvileco kaj komunikante al mia spirito mildegan ondon de paco kiun mi neniam povos forgesi*” Poste li estas nomumata sekretario de Radini Tedeschi, episkopo de Bergamo, kiun li sekvas ĉien, dum liaj episkopaj vizitoj el kiuj li eklernas la nelacigeblan sindevigon de la episkopa vivo. Li fariĝas profesoro pri historio de la Eklezio, pri Patrologio kaj Apologetiko. La kontakto kun la laborista mondo konvinkas lin konsideri ke la laboristoj rajtas kuniĝi per sindikatoj kaj ke la Eklezio devas defendi la malfortulojn, la bezonulojn kaj la subprematojn. El ĉi-tiu pripensado fontas la radikoj de la estonta encikliko “*Mater et magistra*”.

Post la morto de la episkopo de Bergamo komenciĝas nova periodo de lia vivo. Eksplodas la unua mondmilito kaj li estas rekrutata kiel sanitara suboficiro. Li organizas regule la Diservojn por la soldatoj kaj deĵoras helpante vunditojn kaj mortantojn. Sub la efiko de tiuj spertoj li ŝanĝas la pasintan opinion pri la armeo “*marĉo de malvirto*” kaj konvinkiĝas ke la milito estas la plej granda malbono. Iu ajn, kiu komprenas la mesaĝon de Kristo pri la homa, kristana frateco, povas nur abomeni ĝin.

Dum la postmilito Roncalli estas nomumita, de la episkopo de Bergamo, Spirita direktoro de la seminario, li fondas studentan

domon kaj prizorgas la Asocion de patrinoj kaj vidvinoj de batalintoj. Por li la spirita misio kaj la socia sindevigo interligiĝas unu kun la alia.

En 1920 Roncalli estas alvokita al Romo por kunlabori kun la kongregacio por disvastigo de la kredo, "Propaganda Fide". Tia aktivado engaĝas lin en multenombraj vojaĝoj por subteni la promisiajn agadojn, tasko kiu bezonas majstrecon kaj kapablecon penetrigi en la interesojn de pluraj landoj kaj internaciigi la naciajn organismojn. La vojaĝoj kondukas lin al Francio, Belgio, Nederlando, Svislando kaj Germanio. En la jaro 1925 li estas nomumita apostola Vizitanto en Bulgario kaj en la tago de Sankta Jozefo li ricevas episkopan ordinaron. Pro tio li decidas aldoni al sia nomo Angelo, la duan baptnomon Giuseppe. En Sofio, ĉefurbo de Bulgario, li trovas politikan malfacilan situacion, sed, ne cedante, li decidas tuj alfronti ĝin. Li volas ekkoni tiujn landanojn, kaj tial li atingas la plej forajn lokojn, aŭ rajdante, aŭ sur ĉaretoj trenataj de azenoj. Sekve li komprenas, ke la kredantoj volas nepre esti katolikoj, sed Bulgaroj, ne submetitaj al francaj koloniantoj. Ili suferas ĉar la misiistoj kaj religiuloj estas sendataj el Francio. Roncalli ordinas episkopo, iun pastron laŭ bizanca rito, realigas seminarion, kiu akceptas kandidatojn al sacerdoteco ĉu el la latina, ĉu el la orienta ritoj. Li disponas ke la preĝoj, post la Meso, estu recitataj bulgarlingve. Pro tio la fideluloj nomas lin "bona patro". Sekve de tio, alvenas al li de Romo multenombraj protestoj kiuj tre suferigas lin, ĉar ili limigas la emon de lia spirito al agadoj

direktitaj al la animoj.

En 1934 Roncalli fariĝas apostola delegito en Turkio kaj Grekio. En Turkio, jam de dek jaroj, estas forigita islamismo kiel ŝtata religio kaj regas rigora apartigo inter religiaj kaj ŝtataj aŭtoritatoj. La plimulto el la loĝantoj estas muzulmanoj, malmultaj estas grekortodoksoj kaj la katolikoj konstituas etan komunumon, kiu ofte sekvas diversajn ritojn. La leĝo devigas ĉiujn religiulojn surmeti publike civilajn vestojn, tial eĉ Roncalli devas konformiĝi vestante sin per jako, pantalono kaj kravato. En Grekio la politika situacio estas tre konfuza pro proceso de revolucio, kiu kuntrenas ankaŭ la katolikojn. En ambaŭ landoj Roncalli tute sin devigas por elimini la nefidemon kaj reporti ĉiujn al reciproka fido. En Turkio li invitas la fidelulojn preĝi por la bono de ilia lando, eldonas dokumentojn nur turklingve. Li legas la Evangelion kaj la homiliojn utiligante la lokan lingvon kaj pro tio, zorgeme, sin dediĉas perfektigi la studadon de la turka lingvo. Sed ne ĉiuj katolikoj ŝatas ĉi-novaĵojn kaj iuj el ili, naŭzigitaj, forlasas la preĝejon dum la Meso. Li, tamen persistas en sia celo ĉar li opinias, ke tiu estas la sekvenda vojo. Li sentas sin episkopo de ĉiuj, li honoras la Evangelion kaj ne akceptas naciajn hegemoniojn. Li klopodas, eĉ plibonigi la rilatojn kun la kristanoj de la ortodoksaj eklezioj, invitante la Patriarkon, ilian plejsupran ĉefon, al la ceremonio pri la elektado de papo Pio la 12a. Tiu estas la unua paŝo al la transiro de la muro disiganta la roman Eklezion de tiu de Konstantinopolo, jam de la jaro 1054.

Eksplodas la dua mondmilito kaj Roncalli koncentras sian agadon sur programoj, kiuj celas helpi la suferantojn pro malsato en Grekio. kaj sur la savado de Hebreoj. La fama "*Bapto-operacio*" estas elturniĝo, ia formo de enmigra dokumento celanta atingi la saviĝon de centoj da Hebreoj kaj iliaj familianoj el la morto en amasbuĉejoj. Li ne interesiĝas koni la kialon de tia persekutado, ĉar li sentas sin nur ema al helpo de la persekutitoj kaj la bezonuloj.

En la jaro 1945 Roncalli estas alvokata al Parizo kiel apostola nuncio, anstataŭante nuncion Valeri, eksigitan de De Gaŭlle, ĉar juĝitan kunlaboremulo, tiel kiel, pro la sama suspekto, estas forigitaj aliaj tridek episkopoj. Per multa lerteco, li sukcesas malpliigi la nombron de la eksigitaj. Je la militfino Roncalli obtenas ke 250.000 militkaptitoj en Francio, estu liberigitaj, li havigas lernolibrojn al 200 germanaj seminaristoj, enŝlositaj en koncentrejo kaj en tiu sama loko li ordinas la unuajn sacerdotojn. Li vizitas ĉiujn francajn diocezojn, eĉ atingante Alĝerion.

En 1951 li fariĝas Vatikana Observanto ĉe UNESKO en Parizo. En la jaro 1953 li estas ordinata kardinalo kaj ricevas la nomon kiel Patriarko de Venecio. En tiu diocezo li fondas 33 novajn paroĥojn kaj starigas seminarion.

La 28an de oktobro 1958 Angelo Giuseppe Roncalli estas elektita papo kaj li alprenas la nomon Johano la 23a. Nur post kelkaj monatoj la nova papo anoncas ekumenan koncilion, sinodon por la diocezo de Romo kaj la reformon de la Kodo de

Eklezia Juro. La koncilio, tamen, estas la ĉefa temo de lia programo. Post multe da malfacilaĵoj kaj fortaj rezistoj li sukcesas malfermi la duan Vatikanan Koncilion en la jaro 1962. Bedaŭrinde, jam dum la unua sesio oni ekscias ke la papo suferas pro malsano. Malgraŭ tio, la koncilio progresas ĝis la pliakriĝo de lia malbonfarto kaj portempe ĝi interrompiĝas. Ĝi restartos sub la gvidado de Paŭlo la 6a posteulo de papo Roncalli.

La ideo pri koncilio estis jam entenata en la parolado de Johano la 23a, okaze de lia elektado, kiam li anoncis sian intencon doni impulson al vasta renovigo, por ke la ekzemplo de Kristo fariĝu pli efika en la vivo de la homoj, en ilia agado kaj en iliaj institucioj. La koncilio ne nur devus utili al renovigo de la Eklezio, sed ankaŭ esti invito al la fideluloj de la disigitaj komunumoj por ke ili intense serĉu la unuecon kaj gracion, al kiuj sopiras multaj animoj de ĉiuj punktoj de la tero. Ĝi devos estiĝi kunrilatoj inter la tuta kristanaro.

La fakto, ke tia entrepreno startis de la papo mem, revekis atenton trans la kristanaro kaj pretigis la vojon al nova ekume-

na etoso.

Kiel estas skribite en la Dogma Konstitucio de la Eklezio: "Lumen gentium Christus", Kristo estas la lumo de la gentoj, la Eklezio estas en Kristo la instrumento de la intima unuiĝo kun Dio kaj de la unueco de la tuta homaro. La Eklezio, kiel popolo de Dio estas ekvojiranta al Dio kaj al la homoj, kun kiuj ĝi kune pluiras al la komuna Patro. Estis konvinko de papo Roncalli ke eĉ la Sankta Spirito kune kun aliaj spiritoj estas aganta al tiu celo. Temas pri pormisia elano, pri invito al la dialogo kaj al la aŭskultado de la homo vivanta dum modernaj tempoj: tio ne estas izoliĝo aŭ kondamno pro pasintaj eraroj aŭ trouzoj, sed konformiĝo de la liturgio per la enigo de tekstoj en patrina lingvo por igi komprenebla al ĉiuj la vorto de Dio, ne pere de interpretistoj, kaj rezervante al la latina lingvo de la liturgio, rekonsignon de la katolikeco.


Antaŭ kelkaj semajnoj de sia forpaso, la Sanktan Jaŭdon, la papo subskribis sian lastan enciklikonacem in terris" adresitan ne nur al la katolika Eklezio kaj al la kristanaro, sed, unuafoje en la historio, al ĉiuj homoj de

bona volo. Ĝi estas konsiderata la spirita testamento de Johano la 23a, ĝi estas invito al la ŝtatestroj por ke ili streĉu siajn fortojn por paco ne nur ekstera kaj politika, sed paco de la koro, dia paco, laŭ la vortoj de la Evangelio de Luko: "*Gloro al Dio en la altoj kaj sur la tero paco al la homoj, kiujn Li amas*", kaj laŭ la vortoj de Jesuo mem: "*Pacon mi lasas al vi, mian pacon mi donas al vi*". Ne povas ekzisti "justa milito" por obteni la pacon sed devas ekesti ordo fondita sur la Vero, starigita sur la justeco, vivigita kaj integrita de la Karitato, rafinita en la libereco.

La 23an de majo 1963 la papo aperas, lastafoje, ĉe la fenestro de la apostola palaco, li recitas la preĝon "Regina coeli" kaj disdonas la benon dirante: "Ni postkuras la Sinjoron kiu supreniras al la Ĉielo". Li forpasis la trian de junio 1963.

Post dudek jaroj Johano Paŭlo la dua, ĉe la fino de celebrado, diris: "Papo Johano la 23a endormiĝis en la Sinjoro kun la majesto kaj la paco de biblia patriarko".

La 23an de septembro 2000, papo Angelo Giuseppe Roncalli estis beatproklamita.



80° Congresso Italiano di Esperanto

Dal 3 al 10 agosto 2013 si è tenuto, presso il Golf Resort di Castellarò, l'80° Congresso della Federazione Esperantista Italiana. Malgrado il luogo un po' isolato sulla collina ligure a una quindicina di chilometri da Sanremo, la partecipazione è stata numerosa e il programma ricco di eventi interessanti. Hanno aderito circa 250 esperantisti provenienti da una trentina di paesi; tra di essi quasi un centinaio di italiani (tra questi una decina di UECI-anoj). Per l'occasione, don Luigi Alfano di Como ha celebrato a Castellarò una S. Messa in esperanto nella chiesa parrocchiale di San Pietro in Vincoli con la partecipazione di una quarantina di esperantisti provenienti da diversi paesi.

Multe da dankoj

Da una generosa associata della provincia di Imperia sono pervenute all'UECI 2500 euro per il bonfarado con la richiesta di farne pervenire 2000 agli orfani di Goma. Alexis Asumani Bengantundu che ha ricevuto il denaro ringrazia calorosamente sottolineando che questo denaro è giunto in un momento propizio quando sono ancora bassi i prezzi delle uniformi per i ragazzi e del materiale scolastico. Il resto della cifra contribuirà a ripianare il fondo alfabetizzazione, ora in forte deficit, secondo le indicazioni uscite dall'ultima assemblea dell'UECI.

NORME E QUOTE ASSOCIATIVE PER L'ANNO 2013

Associato ordinario <i>con Katolika Sento</i> (SO)	22,00 €
Associato giovane <i>con Katolika Sento</i> (SG)	11,00 €
Associato familiare <i>senza Katolika Sento</i> (SF)	11,00 €
Associato ordinario <i>con Espero Katolika</i> (SOE)	43,00 €
Associato sostenitore <i>senza Katolika Sento</i> (SS)	43,00 €
Associato sostenitore <i>con Espero Katolika</i> (SSE)	86,00 €
Solo abbonamento a Katolika Sento (AK)	10,00 €
Solo abbonamento a Espero Katolika (AE)	21,00 €

È associato giovane chi non ha superato i 25 anni. È associato familiare chi convive con altro associato. Specificare nella causale del versamento la categoria dell'associato, l'anno di nascita dei giovani, l'esatto indirizzo per il recapito del periodico K.S., la destinazione di eventuali offerte.

I versamenti vanno fatti sul C.C. Postale n. 47127675 *Unione Esperantista Cattolica Italiana U.E.C.I.* codice IBAN: IT66 R076 0101 6000 0004 7127 675 Codice BIC/SWIFT: BPPIITRRXXX

Nota: Sull'etichetta/indirizzo con la quale avete ricevuto questa copia di Katolika Sento è indicata la sigla associativa e l'anno di scadenza dell'abbonamento.

COMITATO CENTRALE U.E.C.I.

Presidente: Giovanni **DAMINELLI**, via Lombardia 37, 20099 Sesto S. Giovanni (MI) – tel. 02.2621149 – katolika.sento@ueci.it *(la residenza del presidente è anche sede dell'associazione)*

Vice presidente: fra Pierluigi **SVALDI**, Belvedere San Francesco 1, 38122 Trento – tel. 0461.230392

Segretario/cassiere: Marco **POLITI**, Via Montemartini 4, 20139 Milano – tel. 02.5395237

Consulente culturale-religioso: Ida **BOSSI**, Viale Faenza, 26/7 20142 Milano

Responsabile dei congressi: Giovanni **CONTI**, via F.Filzi 51, 20032 Cormano (MI) – tel. 02.66301958

Responsabile culturale: Norma **COVELLI CESCOTTI**, via E.Fermi 29, 38100 Trento – tel. 0461.925210

Consulente informatico: Tiziana **FOSSATI**, via F.Filzi 30/A, 20035 Lissone (MB) - tel. 039.464942

Consulente editoriale: Carlo **SARANDREA**, Via di Porta Fabbrica 15, 00165 Roma – tel. 06.39638129

Assistente Ecclesiastico: mons. Giovanni **BALCONI**, p.zza Duomo, 16, 20122 Milano

Nota bene: Tutte le comunicazioni alla redazione di Katolika Sento vanno spedite al presidente UECI.

GIOVANI CONCORRETE

L'UECI dispone ancora di n° 3 premi da 258,23 € ciascuno da assegnare a giovani di età compresa tra i 18 e 30 anni, iscritti all'UECI che conseguano il diploma di esperanto di terzo grado. I premi saranno erogati quale contributo per la partecipazione a un congresso dell'UECI o dell'IKUE. Gli interessati si rivolgano al presidente UECI.

AMUZE

Ĉiuj ajn rajtas kontribui sendante al ni siajn humoraĵojn, kondiĉe ke ili estu en Esperanto.



(el www.gioba.it) - sendis Tiziana Fossati

La baleno

Knabineto diskutis kun sia instruistino pri la balenoj. La instruistino diradis, ke estas fizike maleble, ke baleno englutu homon, ĉar ĝia gorgo estas tre mallarĝa.

La knabineto rebatis:

- Tamen profeto Jonas estis englutita de baleno!
- Baleno absolute **ne** povas englutu homon, ĉar tio estas fizike malebla!
- Kiam mi iros al Paradizo mi tion demandas al Jonas!
- Kion vi faros, se Jonas estas en la Infero?
- Tiam **vi** pridemandos lin!

(sendis Carlo Sarandrea)

Pridemandado

- Kiom da tempo vi laboris ĉe la antaŭa firmao?
- Tridek du jarojn.
- Kial vi forlasis la laboron?
- Por amnestio.

(sendis Carlo Odisio)

Paradiza golfludo

En golfejo, apud lago, ludas Moseo, Jesuo kaj maljunulo. Jesuo ĵetas la pilkon en la lagon. Li paŝas sur la akvo, atingas la pilkon kaj per klabo batĵetas ĝin apud la truon. Poste estas la vico de Moseo. Ankaŭ li ĵetas la pilkon en la lagon. Li disigas la akvojn, atingas la pilkon kaj ĵetas ĝin apud la truon.

Fine estas la vico de la maljunulo, kiu ĵetas, ankaŭ li, la pilkon en la lagon. Tuj rano prenas la pilkon en la buŝo kaj saltetante ĵetas ĝin en la truon. Je tiu ĉi punkto Moseo diras al Jesuo:

- Ne! plu ne eblas ludi kun via Patro!

Inter kampanoj

- Kial via azeno, kiam ĝi iaas, fermas la okulojn?
- Ĉar ĝi scias parkere, kion ĝi iaas!

(sendis Ugo Intini)

La vidvino

- Mia edzo antaŭpensis pri ĉio. Antaŭ morti li donis al mi tri kovertojn kaj petis, ke mi malfermu ilin tuj post lia morto kaj plenumu la enskribitajn petojn.
- Kio estis ene?
- En la unua koverto estis 2500 eŭroj, por aĉeti belan ĉerkon, kaj mi aĉetis luksan ĉercon en mahagono.
- Kaj en la dua?
- Estis 5000 eŭroj por aranĝi elstaran entombigan ceremonion. Kaj tion mi faris kun solena s-cta Meso, muzika bando kaj riĉa regalo por la gastoj, kiuj venis konsoli min.
- Kaj en la tria?
- Estis 10000 eŭroj kun la peto aĉeti belan ŝtonon. Vidu kiun belan ringon kun kvin-karata diamanto mi aĉetis? Ĉu al vi plaĉas ĉi tiu ŝtono?

Kalviĝonto

- Doktoro, mia hararo forfalas. Ĉu vi povas doni al mi ion por ĝin konservi?
- Jen, prenu ĉi tiun skatolon.

(sendis Dario Rodriguez)

